

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20—; fremdlando Kĉ 25-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol- lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

PASKA KONFERENCO EN PRAHA

La preparoj de la Organiza Komitato, en kiu sidas delegitoj de diversaj pedagogiaj kaj etikaj societoj kaj delegitoj de ĈAE kaj ĈEI (el la unuaj ni nomas: Pedagogická Jednota Komenského, Konfederace duševních pracovníků, Ĉs. Obec učitelská, Říšský svaz učitelů, Svaz učitelstva ĉs., Ústřední spolek ĉs. profesorů, Kruh přátel střední školy, Ženská národní rada k. a.) progresis jam tiel, ke ni povas alporti oficialan programon kaj aliajn utilajn informojn.

Prezidanto de la respubliko T. G. Masaryk akceptis la protektoraton, la ministroj Beneš kaj Hodža estas honoraj prezidantoj.

La ministerio de fervojoj konsentis doni 33%₀ rabaton por la partoprenantoj de la Konferenco, eksterlandaj kaj enlandaj. La fervojan rabatilon ricevos ĉiu, kiu aliĝos kaj sendos la kotizon 20 Kĉ.

La konferenca karto rajtigas ĉeesti sen plua pago ĉiujn ĝeneralajn aranĝojn de la Konferenco, i. a. ankaŭ la solenan vesperon dimanĉan, kaj la amikan vesperfeston sabatan. Pri ejoj kaj ĉiuj detaloj oni donos informon al ĉiuj aliĝintoj.

La gasoj loĝos en la Studentina hotelpensio Budeč (Vinohrady, Wenzigova), moderna konstruaĵo tre oportuna kaj malmultekosta. Lito po 16 Kĉ, manĝoj po 7 Kĉ, kaj 4 Kĉ. Alia konferenca hotelo estas Beránek (Vinohrady, Tylovo nám.): ĉambroj 1-litaj po 26-30-32 Kĉ, 2-litaj po 53-59 Kĉ ktp. Manĝoj 7 Kĉ (menuo).

Komunaj dormejoj, 10 Kĉ nokte, haveblaj, se oni mendos tuj.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru tion tuj, laŭ adreso de ĈAE. Monon sendu per pagilo de ĈAE aŭ per poŝtmandato. Se vi deziras rezervigi la ĉambron, sendu krom la kotizo 20 Kĉ pliajn 25 Kĉ.

Ĉar la raportoj estos parte en esperanto, parte tradukataj en esperanton, oni facile komprenos ĉion. Tial la konferenco vekas grandan intereson inter la samideanoj. Frua aliĝo estas rekomendinda.

Oficiala programo:

Sabate, 16. IV. je la 11. horo. Partopreno en la solena proklamo de Dia Paco, de Ĉs. Ruĝa Kruco, en Parlamento.

Dimanĉe, 17. IV. je la 20. horo: Oficiala Akcepta Festo.

Lunde, la 18. IV. je la 9:30: Malfermo de la Konferenco en Histologický ústav, Albertov.

I. labora kunsido: Psikologio.

Problemo de pcedukado sur la kampo psikologia, (prof. Bovet, Genève).

Scienca studo pri sentoj kaj antaŭjuĝoj de l' infanoj (D-ro Prescott, Harvard-universitato),

Enketo pri la sentoj de l' infanoj (Dir. R. Fridrich, Brno).

Lunde, la 18. IV. je la 15 h.:

II. labora kunsido: Instruado.

Paceduko kaj lernolibroj de naturscienco (Dr. Karmarýt, Bratislava)

La lernolibroj pri historio (Zd. Franta, landa lerneja inspektoro)

Batalo kontraŭ milita spirito de lernolibroj (Prudhommeaux, Paris — Dr. Möbusz, Lübeck)

La konstruaj klopodoj. Rekomendoj de la Ligo de Nacioj (Du Pasquier, kabinetĉefo, Saarbrück)

Kion oni faris en Kimraj lernejoj (Rev. Davies, Cardiff)

La instruo pri Ligo de Nacioj (Prof. Kronenberg, Bydgoszcz, Pollando)

Paceduko de l' civitanoj. (M. Skořepová, Nĉm. Brod)

Lunde la 18. IV. je la 20 h. **P u b l i k a k u n v e n o** por Prahanoj: La homara ideo en la verko de Komenský (Prof. Casimir, Haag — S-ino Wurmová, Brno — Doc. Dr. Hendrich, Praha — S-ino Pavla Moudrá, Neveklov).

Marde, la 19. IV. je la 9 horo:

III. laborokunsido: Edukado.

Aŭtonomio de l' lernantoj kiel enkonduko al L. d. N. (Prof. Casimir, Haag — D-ro Dengler, Wien)

Internacia kooperado (S-ino Radlinská, Warszawa)

Interlerneja korespondado:

I. Spertoj de l' Ruĝaj Krucoj (Dr. Šmakal, Praha)

II. Korespondado fremdlingva (S-ro Bauer, Kutná Hora)

III. Korespondado en esperanto (S-ro Hahn, Dresden — F-ino Weeks London)

Internacia kampado (Tracy Strong, YMCA, Genève)

Marde, la 19. IV. je la 15 h.: Komisionaj kun-sidoj.

Marde la 19. IV. je la 20 h.: Dua publika kunveno por Prahanoj pri la celoj kaj rezultatoj de la Konferenco.

Merkrede, la 20. IV. je la 9 h.

IV. laborkunsido:

Raportoj de la komisionoj. Voĉdono pri la rezolucioj. Fermo.

Merkrede, la 20. IV. je la 17. h.: Akcepto en Společenský klub, Palác Sylva-Tarrouca.

Dro Ĉ. PARMA:

LABORO NEATENTATA

Se oni estas marŝinta kelke da kilometroj, oni jam parolas — en nia tempo de motor-veturiloj — pri granda laboro. Sed oni ne pripensas, ke samtempe la arboj, starantaj laŭ la stratoj kiujn oni iris, faris ne malpli grandan laboron, ĉerpante akvajn solvaĵojn de saloj el la tero ĝis la pintoj de la branĉaro, ofte respektinde altaj. En la ekvatoraj regionoj troviĝas ja arboj altaj 80-100 metrojn. Kalkulu: 1 litro da solvaĵo pezas pli ol 1 kilogramon; por provizi la branĉaron per nutraĵo, la laboro de la arbo egalas 80-100 kilogramometrojn. Kiom ofte dum ĉiu tago!

Kaj kiam vi oportune sidas en via apogseĝo, ĉu vi iam pensis pri tio, ke via bonfarto rezultas el admirinda laboro de via koro? La koro laboras, ensuĉas kaj elpremas la sangon senriproze: 72fojojn pominute ĝi elspruĉas la sangon en viajn arteriojn, farante laboron da 14 kilogramometroj ĉiunminute, 19.000 kgm dum 24 horoj. La koro, kvankam ĝi prezentas sole 1% de la pezo de ĉiuj muskoloj kaj pezas nur 350 gramojn, faras ĝenerale pli grandan laboron ol la ceteraj muskoloj. Ĝi levus sin mem, per la 24hora efiko de sia laboro, en alton de 5400 metroj. Ĉu vi nun povas imagi la mirindan efikon kaj persistecon de la korlaboro?

Nun vi ne marŝas, nek sidas ripoze, nun vi havas la honoron sidi kun aliaj honorataj invititoj ĉe bankedo okaze de la datreveno de la fondiĝo de la plej disvastigita „Esperanto-Gazeto“. La manĝaĵoj estas nature bonegaj, kaj por ilin digesti vi sekrecias $\frac{1}{4}$ litron da salivoj, 1 litron da stomaksukoj, $\frac{1}{2}$ litron da galo, $\frac{1}{4}$ litron da pankreasa sekreciaĵo kaj mi ne scias kiom da intestaj sekreciaĵoj. Vi konscias nenion pri tio, ĉu? Kiel agrable estas labori tiamaniere! Sed diru, ĉu post

la festena bankedo vi ne sentas viajn makzelojn? Nenio miriga! Esprimate en kilogramoj, ni uzas por maĉado premon de 60-120 kilogramoj. Oni admiras Breitbart kaj liajn vivantajn sekvantojn, sed en la industrio oni fakte ne uzas pli grandan forton por rompi feran stangon. Ankaŭ vi, subkondiĉe de bonaj sanaj dentoj, povos fariĝi Breitbarto!

Sed vi estas laca post la bankedo, vi nun kuŝas sur sofo kaj kviete dormas. Via brusto leviĝas kaj malleviĝas, elaste kiel harmoniko; kaj efektive ĝi enhavas ion, laŭ la funkcio, tre similan al la harmoniko. Estas via pulmo, konsistanta el miloj da saketoj, kiuj senĉese sin faldas kaj malfaldas, kaj se vi povus ilin tute malfaldi, vi konstatus, ke eĉ viaj 3-4 ĉambroj apenaŭ sufiĉus por ĝia surfaco, kiu estas granda 90 kvadratajn metrojn. Kaj vi bezonas ĝin tia, ĉar ĉiuhore 1 kg da via korpo bezonas 400 cm kubajn da oksigeno, do via korpo ĉirkaŭ 30 dm³.

Vi legas la artikolon, sekve vi vivas ankoraŭ. Sed mi certigas vin, ke — se mi elkalkulus, kiomege da laborenergio fariĝos libera el via korpo ĉe via morto, vi certe dezirus tuj morti. Sed, feliĉe, tion elkalkuli mi ne kapablas.

REMEMORAĴOJ PRI LA UNUA TEMPO DE ESPERANTO

O. D. Ribaulb.

II.

La plej interesa letero de Z., kiu estas en la kolekto de la „Espero“, datita 1889, enhavas la konfeson kiu ĵetas neatenditan lumon sur la historion de nia lingvo. En tiu letero la aŭtoro diras ke li kreis la lingvon — unue kaj ĉefe — por sia malfeliĉa popolo, dividita inter multaj landoj kaj lingvoj, popolo, kiu povos ree esti unuigita dank'al la lingvo. Tiu popolo povus esti apostolo de la lingvo internacia, pro sia tutmonda rolo kaj pro siaj historiaj tradicioj. Kun la lingvo venus la nova religio (Homaranismo, aŭ Hilelismo) kiu fine fariĝus la tutmonda religio.

Do, la amo al sia popolo, la naciismo, estis ĉefa movilo por Z., kiu aldonas en la sama letero: se mi ne estus firme kredanta ke la nova religio triumfos, mi neniam publikigus la lingvon, kiu estas nur la rimedo, ne celo. Ni resumu la leteron: La homaro bezonas la novan religion. Tiu religio bezonas sian lingvon kaj siajn apostolojn. Do, kreiĝas por tiu celo Esperanto, kaj estas fatale destinita por la apostoleco la popolo de Z.

Nun, la ĉefaj himnoj kaj poezioj de Z. aspektas en ilia vera rolo, kaj la esprimoj „nova sento“,

„nia sankta afero“, „la celo“, ktp. povas esti komprenataj en ilia vera senco. La okcidentaj pioniroj, pro nesufiĉa informiteco kaj pro sia limigita mentaleco, neniam povis kompreni la ideojn de Z., kiujn ili malklare nomis „la interna ideo“. Tiu nomo estis uzata ankaŭ de Z., sed en tute klara senco, tamen nekaptebla por la okcidentuloj. Kiam oni skribas pri la Z-aj ideoj: kunfratiĝo de la popoloj, homa familio, homa egaleco sendependa de la lingvo, raso, religio, — oni diras ĝuste, sed nekomplete, dum la intima programo de Z. estis tute klara, konkreta, palpebla. Sed Z. ne estis komprenata de tiuj, kiuj fieris esti liaj disciploj, kiuj pretendis paroli la klaran lingvon, kreitan por la tutmonda interkompreno. Kiam la koroj malsamas, la lingvo komuna, eĉ patrin-lingvo, ne kapablas igi kompreni. La tragedio de Z., la ĉefa kaŭzo de liaj moralaj suferoj, estis la fakto ke oni lin ne komprenis, ne volis kompreni, ke oni krude malakceptis liajn „ideojn“, ke oni limigis la aferon al la nura Esperantismo: „Oni ne devas intermiksi — skribas Z. en sia homaranisma programo — la homaranisman kun la esperantismo. Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed tute ne identaj.“

Kiel ĉiuj fondintoj de religioj, ankaŭ Z. kreis dogmojn, kiujn ĉiu estis libera akcepti aŭ ne, sed ne diskuti: „La homaranoj estas konviktaj, ke ili staras sur fundamento de absoluta vero, kiu pli aŭ malpli frue devos venki...“ Kaj kelklinie poste: „La homaranismo bazita ne sur tempaj politikaj kondiĉoj de la vivo de tiu aŭ alia gento, ne sur elpensitaj religiaj dogmoj, ne sur tempaj modaj doktrinoj kaj fluoj (movadoj), sed sur vera absoluta, ĉiuloka kaj ĉiutempa...“ Pro la taktikaj motivoj, niaj propagandistoj substrekas ke Esperanto celas fariĝi nur helpa lingvo, kiu tute ne volas anstataŭi la naciajn. Sed tia ne estis la penso de Z. kaj de liaj disciploj: „La homaranoj esperas, ke per konstanta reciproka komunikigado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon...“ Oni ne povas diri pli klare ke temas pri estonta lingvo de la homaro, sola, unika, kiu floros sur la ruinoj de la kadukiĝaj naciaj idiomoj. „... mian lingvon mi ne rigardas kiel mian idolon kaj mia idealo estas lingvo neŭtrale homa (E.)“

Relegu la himnon, atente relegu, kaj eble vi komprenos ke ĝi esprimas sincerajn sentojn kaj aspirojn, ke ne nuraj frazoj ĝi estas. Kaj kia abismo — inter tiuj, kiuj ĝin kantas konvinke, elkore, kun konscio ke ilia vivo harmonias kun la paroloj de la himno, — kaj tiuj, kiuj ĝin mekanike ripetas, (pro falsa formaleco, ĉar ili adoras aliajn idolojn: ŝovinisman, egoismon, ambicion kaj oron). Ni konas historion de Bramanismo kaj Budhismo, kiuj unue

estis altaj doktrinoj de la superhoma perfekteco, sed kiuj iom post iom fariĝis ludiloj kaj monakiriloj en la manoj de „praktikaj“ personoj, ĝis la nuna abomena idolana stato. Tio signifas ke la plej bonaj kaj belaj aĵoj, en la manoj de la „laikoj“ iĝos la plej ordinaraj, vulgaraj, profanaĵoj. Nu, dum sia longa martirvojo Z. vidis, kiel nia sankta afero — de mano al mano — transiras al pli kaj pli „praktikaj“ personoj, por kiuj la interna ideo, la amo, la vero, ktp. ekzistas nur kiel sociaj konvencioj, similaj al la neĝe-blankaj kolumoj, vizitkartoj, nobelaj titoloj, sub kiuj kaŝas sin plej vulgare apetito por materialaj ĝuoj kaj plej ordinara egoismo, kapabla piedpremi, se el tio sekvas profito, la amikecon, fidelecon, justaĵon. Se ni kredus al kelkaj propagandistoj de E., tiu hipokriteco estas necesa kiel la sola praktika taktiko, ĉar — por altiri ĉiam novajn amasojn da adeptoj, estas tute necese ke ili vidu la idealismon de la tuta Esperantista Popolo. Ni povas konsenti ke tiu taktiko estas utila kaj profitiga por kelkaj apartaj personoj, por kelkaj komercaj ejoj, sed ni energie neas ĝian utilecon por nia afero mem. „... ĉiuj kompromisoj estas maljustaj kaj nefortikaj...“ (Z.). (Daŭrigo sekvos.)

ĈU LA „TUTMONDA STATISTIKO“ SUKCESOS ?

(Dro Dietterle.)

Ĉiuj, kiuj respondis al mia statistika alvoko, por helpi entreprenon taŭgan por nia propagando, havas la rajton, scii ion pri la rezultato atingita ĝis nun.

Alvenis ĝis la 1-a de Februaro 1927 entute: 1457 raportoj,

el asocioj, federacioj ktp. 46

el grupoj 760

de izole vivantaj esperantistoj 651

Ĉi tiuj ciferoj ja estas — per si mem — jam iomete efikaj kaj imponaj, kaj mi treege dankas al ĉiuj raportintoj.

Kvankam inter la respondoj estas kelkaj, kiuj kaŭzis tute superfluan kaj tamen ne kontentigan laboron (ĉar ili prezentis ne responditajn demandojn, sed longajn leterojn aŭ enhavis neprecizajn sciigojn), la plejmulto estis tre konforma al la tri demandoj kaj liveros taŭgan bazon por la definitiva laboro.

Sed la ciferoj samtempe ankaŭ montras kaj pruvas, ke nur parto de la samideanaro (ekz. el la fakaj asocioj respondis nur tre malmultaj) sufiĉe bone komprenis la intencan de la statistika laboro, kiu atingos la celon celitan nur, se ĉiuj helpos. Kaj ĉiuj povus helpi, se ekzistus la bona volo. Ĝi estas la antaŭkondiĉo, sen kiu la tuta statistiko restos nekompleta torso aŭ eĉ ne torso, sed nur malperfekta fragmento, montrante, ke en la tiel nomata „samideanaro“ tute ne regas la samaj ideoj pri ĝenerala afero kaj samtempe ne montrante tion, kion ni volas montri al la mondo.

En mia alvoko pri Tutmonda Statistiko mi tute klare diris, ke ĝi estos mia unua kaj lasta. Oni ne povas devigi iun al libervola laboro, kiu fariĝas deviga laboro por ĉiu, kiu komprenas la situacion de nia movado. Mi ne volas peti tiujn, kiuj ne volas kunlabori — mi ja ne volas ion ajn por mi. Kun

ĉiuj, kiuj ĝis nun raportis, mi deziras nur ion por ĉiuj, nome havigi al nia movado bonan — tre necesan — propagandilon. propagandilon pli efikan ol multaj paroladoj kaj gazetartikoloj. Rezultaton eble nekontentigan la neraportintaj samideanoj skribu en sian propran konton, ne en la mian aŭ en la konton de la volonte kaj diligente raportintaj samideanoj.

Estos tute neefektivebla laboro, admoni per kelk-milaj specialaj leteroj tiujn, kiuj malatentas tion, kio ŝajnas deo por ĉiuj veraj esperantistoj.

Estas ankoraŭ tempo, fari la ĝis nun nefaritan kaj sendi la ĝis nun nesenditajn raportojn. Post la 15-a de Aprilo mi devos fari grandan strekon sub la laboro farita ĝis tiam, minimume rilate la raportojn en Eŭropo. Poste estas tute neeble, ĉiutage revizii la rezultatojn kaj korekti ilin senfine; ĉar tiamaniere la laboro neniam estos preta, kaj mi esperis, ke ĝi povus esti preta por la tempo de la internaciaj kongresoj de ĉi tiu jaro.

Se mi petas ion, mi nur petas, ke oni ne kulpigu min pro rezultato netaŭga kaj nekontentiga kaj ke oni ne fanfaronu pri „fideleco al nia majstro“, se oni rezignas al tre malgranda laboro, kiu celas honori lian memoron dum nia jubilea jaro. —

Oni demandis — eĉ riproĉis — min tre ofte tial, ĉar mi en miaj demandaroj ne liveris difinon pri tio, kion signifas la vorto „Esperantisto“. Mia respondo estas tre, tre simpla. Mi ne volas esti pli prudenta ol nia D-ro Zamenhof, kiu jam tute klare difinis, kiu estu rigardata kiel „Esperantisto“. Li diris tion en la Deklaracio de Boulogne sur Mer;

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al iu aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.“

Karaj gesamideanoj, laŭ ĉi tiu difino bonvolu respondi la koncernan demandon aŭ, se vi jam sendis vian raporton, nerispondinte al la aludita demando, fari tion ankoraŭ dum la venonta tempo.

Tre multaj samideanoj aparte skribis, ke ili aprobas la statistikan planon, kelkaj faris tion eĉ entuziasme. Ili gratulis min pro la projektita statistiko kaj sendis salutojn. Koregan dankon, mi dankas kaj salutas vin ĉiujn.

LINGVA FAKO

Z ESPERANTSKE FRAZELOGIE

A. Příklady pro překlad (2).

21. Adepto de la epikurismo. Adepto de la pentrarto. —

22. Adiaŭ, kara amiko, ĝis revido en la proksima kongreso! Adiaŭa vorto. Adiaŭa kunveno.

23. Adicii unu nombron al alia. — Sumigi = adicii. La sumo de kvin kaj naŭ estas dek kvar. Elspezi grandan sumon. — Kalkuli sian monon. Kalkuli la voĉojn por kaj kontraŭ la propono. Kalkuli la jaran profiton, konante la sumon kaj la procenton. Alkalkuli la poŝtajn spezojn. Dekalkuli la rabaton. La steloj de la serena ĉielo ŝajnas nekalkuleblaj. —

24. „Bona“ estas adjektivo (bona knabo). Adjektiva fleksio. Adjektiva esprimo.

25. Administristi bienon. Administristi domon. Administristi kompanion. Administranto. Admi-

nistrantaro (administracio). — Direkti ŝipon, paŝojn, rigardon. Direkti oficon, aferojn. — Regi ŝtaton. Regi sian koleron. Regi sin mem. Ekregis plena silento. La principo de la internacieco superregas ĉiujn aliajn en la universala lingvo. Reganto, regato. Registaro. Regado. Interrego.

26. Admiri heroon. Admiri kuraĝon. Admirinda modesteco. — Mi miras, ke vi ne respondis mian leteron. Mirinda. Mirigi. — Adorisan edzinon. Adori la poezion. Kantistino, adorata de la adorantoj. —

27. La patrino admonis la filon al la diligenteeco. — Averti iun pri proksimiĝanta fulmotondro. Averti.

28. Adopti orfojn. — Sr. ĉ. 20. a 21.

29. La adreso de doktoro Zamenhof estis: Varsovio, strato Dzika n^o (numero) 9 (naŭ). La adreso devas esti ĉiam skribata tre legeble. Sur la koverto oni skribas ne sole la nomon de la adresato, sed ankaŭ tiun de la adresanto, por ke la poŝto povu resendi al li la leteron en okazo de bezono. Adresi. —

30. „Bone“, „hejme“, „vespere“ estas adverbaj. „Kun ĝojo“ estas adverba esprimo. —

31. Estu mia advokato antaŭ mia edzino. —

32. Aera veziketo. Aera fenomeno. Aera vegetaĵo. Aerumi litajon, ĉambron. — Ventoli tunelon. Ventolilo. —

33. Afabla homo. Afabla vorto. Afableco. Afablaĵo. Malafabla. — Gentila homo. Gentila. ago. La afableco estas eco kunnaskita, la gentileco akirita. — Granda estos la komplezo, se vi mendos por mi ĉambron en hotelo. Kompleza homo. kompleza ago. Komplezeco. — Volonte mi akceptas vian proponon promeni en la arbaro. —

34. Malespero, ravo estas afekcioj. — Afekti modestecon. Afekto. Afektema.

35. Dum vojaĝo oni vidas multajn interesajn aferojn. Komerca afero. Juĝa afero. — Objekto de studo.

76. Prefiksoj kaj sufiksoj estas afiksoj.

37. Afiŝo = presita anonco pri publika spektaklo. Afiŝi. — Avizo pri baldaŭa apero de verko. Avizi. — Anonci en gazeto. Anonco. — Prospekto = presajo anoncanta la programon kaj planon de nova gazeto, verko, entrepreno. — Averti iun pri proksimiĝanta fulmotondro. Averti.

38. Afriŝmo = penso, principo, koncize esprimita, ĉerpita el verko de fama aŭtoro. — Ekzemplo de devizo: „La honoro kaj la patrujo.“ Facila internacia komprenebleco estas nia devizo. — Maksimo = principo, praktika konsilo por la vivo, esprimita en mallonga frazo. — Moto = frazo, citita el la aŭtoro kaj metita antaŭ la verko aŭ artikolo por esprimi ĝian ĉefan ideon. — Ekzemplo de proverbo: „Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras“. La fideleco de la hundo estas proverba. — Sentenco de Seneko. — La koko estas emblemo de la vigleco. —

39. La adresato pagas punon por neafrankita letero. A franki leteron.

B. Příklad příkladů (1).

bude uveřejněn příště; zatím přijímají se překlady čtenářů ke konkursu o ceny dále.

Znovu upozorňujeme na úvod k této Frazeologii v č. 1—2 a doporučujeme překládati tyto příklady a nám zasílati. Velmi vhodná látka pro schůze klubů a pro pokračovací kursy.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333

NUMERO 17—18.

MARTO—APRILLO 1927.

RUD. HROMADA:

ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO EN 1926

(Laŭ la raporto prezentita al la ĝenerala kunveno de ĈAE, la 13. Marto 1927, kaj tie per ĉiuj voĉoj akceptita.)

La komitato elektita en la ĝenerala kunveno la 28. Februaro 1926 konstituĝis jene: Prezidanto S-ro J. EiseIt Praha; Vicprezidanto Dr. Stan. Kamaryt en Bratislava; Ĝenerala sekretario Rud. Hromada; Kasisto S-ro Fr. Novák. La ceteraj komitatanoj restis sen specialaj funkcioj.

Membroj. La membrolibro de ĈAE enhavas 2149 nomojn de la personoj, kiuj depost 1920 aliĝis. Same kiel en la pasintjara raporto ni opinias membro sole la personon, kiu pagis por 1926 la plenan kotizon 16 Kĉ aŭ ĝian laŭtempan ekvivalenton. Tiel kalkulate ĈAE havis 470 membrojn: 466 aktivajn, 1 subtenantan po 50 Kĉ, kaj 3 dumvivajn (po 500 Kĉ unufoje por ĉiam). La plenan kotizon 16 Kĉ el 466 membroj pagis 441 m., unu po 12 Kĉ; 16 m. po 8 Kĉ, 1 m. po 6 Kĉ kaj 7 m. po 4 Kĉ.

Dumvivaj membroj estas S-roj: Ing. Janěčka, ministeria konsilanto Mil. Schmidt kaj komercisto M. Weisskopf. Malgraŭ sia dumviva membreco S-ro Schmidt pagis krome la jaran kotizon de la aktivaj membroj.

La kategorio de subtenantaj membroj ankaŭ dum 1926 ne trovis ankoraŭ komprenon de niaj samideanoj. Mi denove rememorigas, ke ĝin vi kreis en la ĝenerala kunveno en 1925 por ke viaj amikoj nesesperantistoj havu eblecon iel subteni la aferon de esperanto, kun kiu ili simpatias. Dume vi gajnis nenium el tiaj homoj. Unu sola subtenanta membro estas nia kasisto S-ro Novák.

Inter la 470 pagintaj membroj estas 100 novaj; repagis do por 1926: 370 p., ŝuldas ankoraŭ 119 p. Sed ĉar en 1925 estis 489 membroj, mankas nur 19 membroj por ke la nombro estu la sama kiel en 1925. Ankaŭ la sumo da espenzitaĵoj kotizoj restis preskaŭ la sama: Kĉ 7286 (en 1925: 7391 Kĉ).

La 470 membroj troviĝas en 126 lokoj: (En 1925: 114 lokoj.)

En lokoj kie ekzistas klubo, ĈAE havas ĉi tiom da membroj: (La noto „iz“ signifas ke la membroj aliĝis memvole, sen pero de la klubo loka.)

- 122 Praha (en tio 110 Klubo, 12 aliaj)
- 54 Ústí nad Orlicí
- 28 Ĉervený Kostelec
- 27 Košice
- 25 Hradec Králové
- 10 Jablunné nad Orlicí
- 10 Jaroměř
- 10 Kolín
- 9 Vyškov
- 9 Orlová (Lazy, Poruba, D. Suchá)
- 7 Olomouc
- 6 Choceň
- 6 Přerov
- 5 Brno (iz.)
- 4 Pardubice (iz.)
- 4 Plzeň (iz.)
- 3 Bratislava (iz.)
- 3 České Budějovice (iz.)
- 3 Holešov
- 3 Nymburk (iz.)
- po 2 Kladno, Bystřice p. Host., Sl. Ostrava, Jičín
- po 1 Benešov, Hora Kutná, Jilemnice, Luže, Opava, Prostějov, Náchod

Lokoj senklubaj:

- 3 Čáslav
- 3 Jasina
- po 2 Čaca, Karvinná, Bzenec, Pelhřimov, Velká Slatina, Tišnov, Turnov, Zvolen
- po 1 membro en 85 senklubaj lokoj, ofte eĉ vilaĝoj.

Mi rekomendas al atenta esploro ĉi tiujn ciferojn. Ili estas multe pli bonaj ol ni povis raportiti ekz. en la komenco de la vintro. Sed ĉiam ankoraŭ ni estas tre malproksime de la *celcifero 1000 membroj*. La kaŭzoj, kiujn mi detale preparolis en la raporto pri 1925, daŭras ankoraŭ, valorante ankaŭ por 1926.

Sed kiel ni povas akcepti la plendon, ke oni ne povas varbi, ĉar la kotizo estas tro (!) alta, se ni vidas en la supra tabelo

klubojn, kies ĉiuj (aŭ preskaŭ ĉiuj) membroj estas ankaŭ membroj de ĈAE? Ili aliĝis certe ne pro tio, ke ili estas eksterordinare riĉaj por povi pagi la 16 Kč, sed pro tio, ke inter ili troviĝas funkciuloj komprenantaj, ke en unuiĝo estas forto, ke iu centro propaganda estas necesa. Komparu kun tio la tri grandajn urbojn ĉeĥajn: Brno, Plzeň kaj Budějovice.

Ni enketis inter tiaj eksternsociaj kluboj por sciigi, kiom da iliaj membroj aliĝis al ĈAE, se la kotizo estus 30 Kč (anst. 36 Kč) kune kun abono de La Progreso. Nia timeto, ke la ŝparo de 6 Kč ne estos decida, tie, kie ĝenerale ne estas kompreno aŭ bona volo, montriĝis prava: En neniu el tiaj kluboj tia aranĝo havus kontentigan rezulton.

La komitato decidis provi en Olomouc specialan aranĝon kombinante la membrecon kun la abono en alia maniero. La rezultato montriĝis tia, ke anstataŭ 7 membroj izolaj en 1926, la Asocio jam nun havas 32 membrojn por 1927 inter la klubanoj de Olomouc, kion ni unuavice dankas al la agemo de la grupa prezidanto, S-ro Kudela, nia komitatano.

Similan aranĝon ni refoje proponos al la ceteraj lokoj, kie ekzistas multaj esperantistoj kaj grandaj kluboj. Espereble en tiu ĉi jubilea jaro ni sukcesos.

La ideo de S-roj Jakob kaj Sklenčka kunigi la kotizojn por UEA kaj ĈAE (resp. GEL) tiel, ke la UEA-kotizo estus 60 Kč el kiuj 10 Kč irus al ĈAE resp. al GEL evoluigis tiugrade, ke nun ĝi ne plu estus komplikita per ekzisto de La Progreso, kiu esprimis sian fidon, ke ĝi kapablu ekzisti memstare eĉ tiam. Sed tia aranĝo ne povus esti tutŝtata, ĉar GEL ne povus akcepti ĝin pro sia sistemo, tre sukcesa por ĝi, laŭ kiu ĝi dividas la kotizon inter kluboj, regionoj, Ligo kaj Marto.

Kluboj. Laŭ nia scio, ekzistas 32 kluboj de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Ilia sinteno al la propaganda centro montriĝas en la supra tabelo. *Plimultiĝis membroj* de ĈAE en kluboj: Praha, Ústí n/O., Vyškov, Olomouc, Choceň, kaj speciale en Košice (25 anst. 2). Kontraŭe, ĝis nun neniu aliĝis el Nové Zámky (en 1925: 6 membroj) kaj el la klubo Ostrava Sl. aliĝis sole 2 anst. 32. Kursojn faris preskaŭ ĉiuj kluboj, pri kio ni regule informas en la rubriko Bultena: Movado en ĈSR.

Spite la senĉesa admonado, kelka

kluboj kaj multaj kursestroj ne volas kompreni, ke estas necese, ke en iu centra punkto estu kolektataj precizaj informoj pri tio, kio okazas en la ĉs. movado. Ni tre insistas pri la graveco de tiu ĉi laboro, ĉar ĝuste en tiu ĉi jubilea jaro, volante havigi al ni informojn pri tio, kiel la movado fartis kaj evoluis antaŭ 10-15-20-25 jaroj, ni ne sukcesas, ĉar la datoj iam presitaj estas nur ege nekompletaj. Estus utile ankaŭ akcenti, ke la devon informi nian Asocion havas ankaŭ Delegitoj de UEA koncerne iliajn laborojn propagandajn. Teritoria Oficejo de UEA en Hradec Králové estas ja centro sole por pure UEA-aferoj ekz. varbado.

Malgraŭ sia nekompleteco, la rubriko pri la ĉs. movado en la Bulteno Asocia montras notindan nombron da kursoj, da kurslokoj kaj da kursanoj. *Laŭ ĝi cca 1000 personoj lernis esperanton dum 1926 en cca 50 kursoj de 37 lokoj.*

Estos tasko tre utila, de la venonta komitato, pli atenti pri tiuj ĉi novaj kursoj, post ilia absolvo de la kurso.

El la 100 novaj membroj de ĈAE sole nemultaj, oni povus diri sole kelkaj, devenas el tia kursa instruado, la ceteraj estas izolaj memlernantoj, varbitaj pere de gazet-artikoloj aŭ gazetrubrikoj.

Estus utile scii la spertojn de S-ro Sklenčka koncerne liajn novajn membrojn.

Sub influo de la jubilea jaro kaj de la jubilea statistiko, kaj sub impreso de la spertoj, ricevitaj sekve de tre mankhava skriba dokumentaro pri evoluo de nia ĉs. movado, mi volus ĉi tie akcenti la gravan rolon de la *protokolistoj* de niaj kluboj. Se la sekretario kaj ĉiuj komitatanoj devas kunlabori por ke la agado kluba estu plej rezultodona, la protokolisto estas kvazaŭ historiisto, kiu notas la traktadojn de la kunvenoj, kaj la agajn rezultatojn de tiuj traktadoj. Li notu ilin havante ĉiam en la memoro, ke la enskriboj devas por la estonta legonto (kaj ofte por la komitato mem antaŭ la jarkunveno) prezenti plenan, fidelan bildon de la kluba vivo. Ciferoj tie ne manku, sukcesoj estu motivitaj, same malsukcesoj sincere konstatitaj, kun indiko, kio ilin kaŭzis.

En tiu ĉi rilato ni ricevis preskaŭ modelan raporton pri la agado de la Klubo en Hradec Králové en la jaro 1926.

Multiĝas jubileoj de niaj kluboj: En 1920 jfestis siajn 25 jarojn E. K. Brno, siajn 26

jarojn E. K. Budějovice, en 1927 festos siajn 25 jarojn E. K. Praha.

Regionaj kunvenoj partoprenataj de delegito de la komitato estis tri: Ústí n./O., Jaroměř, Bohdaneč. En la financa raporto vi vidas, ke partopreni pliajn, kaj precipe la moraviajn kaj sileziajn, ne estis eble. Tamen la komitato rigardas ĉiam valida la siatempan decidon, partopreni kiel eble plej multajn, kaj en 1927 ni volas provi aranĝadon de tiaj kunvenoj direkte el Praha, en la lokoj, kie tieaj samideanoj ne faras ilin.

La III. ĉs. kongreso okazis en Bratislava, la 1—2 Majo 1926. Aliĝis 239 personoj, partoprenis 211 p. el 50 lokoj de la respubliko. El tiu ĉi vidpunkto la kongreso estis tre sukcesa. Ankaŭ finance, ĉar ĝi finis per profito 580·18 Kč. Detalaj informoj estis publikigitaj en la Bulteno 11—12 (Majo-Junio 1926). Financajn dokumentojn por revizio ni ĝis nun ne ricevis, same ne la monon.

Malpli kontentiga estis la kongreso, se ni observas la rezultaton de ĝiaj belaj rezolucioj. La multhora traktado pri organiza problemoj finiĝis per unuanima akcepto de la rezolucio, laŭ kiu ĉiu Ĉeĥa kaj Slovaka Esp-isto devas aliĝi al ĈAE, ĉiu germana al GEL. *Tiu rezolucio estis solene ignorata de preskaŭ ĉiuj, kiuj ĝin voĉdonis; tiu neserioza agado igas nin pensi pri alia aranĝo de la tutŝtataj kongresoj.*

La IV. kongreso estis okazonta en Teplice-Šanov. Pro la Paska Konferenco en Praha ĝi estis prokrastita por la jaro 1928.

Propagando

Gazetara. Ankaŭ en 1926 daŭris nia sistemo de tiu ĉi tre efika propagando, priskribita detale en la lastjara raporto. Krom tio plimultiĝis memstaraj artikoloj de niaj samideanoj en: Nový Lid (Petr), Moravsko-slezský deník (Dr. Parma kaj Adamík), en instruistaj gazetoj (F-ino Šupichová), en ĝendarmaj (S-ro Vávrovský), en ilustrita semajna gazeto Maják (S-ro Zatloukal, Přerov), en skolta Všem (speciala numero per laboro de S-ro Janko Roudnice), en Přítomnost longa artikolo de S-ro Boczkowski, en Masarykův lid (S-ro Rádek), en Stráž Pokroku (Sklenčka Hradec Králové), en Ilustrovaný Věstník (Frýdek-Golasowski), kaj multaj aliaj.

Laŭ la eltranĉaĵoj ricevataj de la Eltranĉaĵa Oficejo kaj de unuopaj samideanoj,

la tuta sumo de la informoj pri esperanto dum 1926 estis: *Aperis 1306 (740) ĉeĥaj kaj slovakaj informoj en 161 (151) gazetoj de 50 (44) lokoj.* La ciferoj en la parentezoj rilatas al la jaro 1926.

Plie, pri aliaj sistemoj de lingvo internacia ni trovis 34 informojn, grandparte pri la ido-kongreso en Praha.

En du Wien-aj ĉeĥaj gazetoj 15 informoj.

La sekvanta tabelo montras ĉe ĉiu loko, kiom da *informoj* en kiom da *gazetoj* aperis:

Praha	307	en 68 gazetoj
M. Ostrava	243	5
Brno	120	17
Kroměříž	62	2
Žamberk	51	1
Bratislava	45	9
Plzeň	45	5
Olomouc	44	6
Liberec	40	2
České Budějovice	39	8
Turnov	38	1
Náchod	35	4
Košice	28	4
Klatovy	26	1
Hradec Králové	24	6
Přerov	18	2
Gemer	16	1
Jičín	12	3

La ceteraj 32 lokoj havas malpli ol 10 informojn, kvankam inter ili troviĝis gravaj lokoj, kiel Kolín, Roudnice, Ústí n./O., Prostějov, Jaroměř, Pardubice k. a.

Tabelo montranta, kiom da informoj aperis en ĉiu *monato*, aspektas jene:

januaro	147
februaro	150
marto	123
aprilo	150
majo	98
junio	44
julio	78
aŭgusto	132
septembro	101
oktobro	103
novembro	81
decembro	54
sen-dataj	45

sume 1306 informoj.

En la nova komitato ni bezonus unu personon, kiu sin plene okupus per tiu ĉi gazetara servo. Tiam la rezultatoj estus ankoraŭ pli belaj. Temas precipe pri la gazetoj de Praha, kie en la fino de 1926 laboris S-ro Pitlík, kaj pri la fakaj gazetoj.

Ni ĉiam konscias, ke la oftaj gazetaj informoj pri nia movado, eĉ se ili estus nur pri la kluba vivo, multe helpas al la kreo de la favora „publika opinio“.

Propagando per paroladoj. Asocio mem ne estis petata sendi oratoron, kaj la komitato mem neniun sendis el propra iniciato, pro nesufiĉaj monrimedoj. — Tekston de la parolado, verkitan siatempe de S-ro Eiselt, ni sendis, laŭ peto, al kelkaj lokoj.

Pri la paroladoj de unuopaj samideanoj ni estas de tempo al tempo informataj kaj povas noti ke: en Kroměříž parolis Dro Pospíšil el Olomouc; en Nový Hradec Králové S-ro Lukáš; en Most S-ro Krišl; en Plzeň S-ro Gross; en Motyčín F-ino Vlčková; en Moravská Ostrava S-ro Fridrich el Brno; en Olomouc S-ro Neužil havis 10 paroladojn pri Edinburga kongreso; en Praha F-inoj Šupichová kaj Dlouhá al fervojistinoj.

Ekspozicia materialo, administrata de S-ro Šustr, estis kompletigita per pluaj donacoj (Dro Kamaryt) kaj pruntita al kelkaj lokoj, inter ili regionaj ekspozicioj en Jaroměř, Místek, Orlová, radia ekspozicio en Brno, plie en Jilemnice k. a.

Ĉefeĉ. Post kiam Asocio sciigis, ke ĝin eldonos Instituto, ni transdonis la aferon al tiu ĉi. La Instituto eldonis la ŝlosilon en kvanto de 20.000 ekz. kaj estas tre dezirinde, ke niaj membroj uzu ĝin dum sia propagando.

Flugfolioj. Ni eldonis en julio 5000 Esperanto — mezinárodní pojítka národů, kiuj baldaŭ elĉerpiĝis, tiel ke ni devis en decembro eldoni pliajn 5000 ekz. Kelkaj kluboj mendis, iuj eĉ grandan kvanton, ekz. Hradec Králové 1.500, parte nia Asocio donacis al kluboj, konsciante sian devon helpadi en la loka propagando. Por la ekspozicioj en Místek ni donacis al la loka klubo (neasocia) 500, por Orlová (asocia klubo) ankaŭ 500, al Jaroměř 250, Trutnov 200, Luže 50, Kladno 500, krom negrandaj kvantoj al unuopaj propagandistoj en tre diversaj lokoj.

Bedaŭrinde ne ĉiam montriĝis prava nia atendo, ke tiaj samideanoj aŭ kluboj faros konsekvencojn, vidante utilecon de la centro, kiu en grandaj kvantoj povas eldonadi utilajn propagandilojn por malmultekosta aĉeto aŭ eĉ por donaci ilin al fervoraj propagandistoj.

„Esperanto kaj ĝiaj kritikantoj“, grava

verko de Prof. Collinson, aperis pere de la eldonejo de J. Springer, kiu afable konsentis pri tio. Ni ne timis, kvankam niaj kontraŭuloj ofte tion diras pri ni, informi niajn membrojn pri aliaj sistemoj. La verko de Prof. Collinson donas al niaj membroj specialan utilon konatigante ilin kun kritikoj de esperanto kaj kun scienca rebato, montrante samtempe pli detale ol niaj lernolibroj la scienca bazon de nia lingvo. La broŝuro estis sendita al multaj kluboj kaj en la venontaj tagoj ni ĝin sendos al ĉiuj ceteraj. Krome ni uzas ĝin laŭplane por aliaj lokoj kaj personoj neesperantistaj.

Oficiala instruado

Altlerneja. Lektoro de esperanto en la ĉeĥa Politeknika lernejo en Praha estas S-ro Pitlik.

Lektoro de esp. en la Alta Minista lernejo en Příbram estas Dro A. Šilha.

Duagrada. Ni ne ricevis precizajn informojn.

Komercaj Akademioj. En *Hradec Králové* Prof. Smeták instruas 29 lernantojn en la lerneja jaro 1926—7 (kp. 17 l. en 1924—5 kaj 16 l. en 1925—6).

En *Mor. Ostrava* instruas S-ro Janěčka 23 gelernantojn.

Unuagrada: En *Olomouc* S-ro Neužil instruas 20 lernantojn. — En la burĝaj lernejoj: *Hora Kutná* Dir. Horáček 20 lernantojn, *Nová Paka* F-ino R. Kříkavová 54 l., en *Stupava* S-ro Bartal x lernantojn.

Blindula: En Instituto de Praha-*Hradčany* (monahina) oficiala instruado okazis en la 4. klaso.

Kvankam do la oficialaj dekretoj permesas la instruadon, la instruado ne okazas en sufiĉa nombro; ofte administraj formalajoj tro akcentataj de nefavoraj direktoroj aŭ inspektoroj malhelpas. Ni havas jam certan nombron da ŝtate ekzamenitaj instruistoj de esperanto, kaj estus dezirinde, ke ili faru uzon de sia diplomo.

Plie ni dezirus, ke novaj aliaj ekzamenigitoj. En tiu rilato la germanaj esperantistoj estas pli viglaj.

Dum 1926 la ministerio de instruado nomis esperanto-ekzamenantojn ankaŭ en Bratislava: Dron Kamaryt por la ĉeĥoslovaka kaj S-ron Wanjitsek por la hungara lingvo.

Rilatoj kun aŭtoritatoj

La ministerio de instruado nomis la ekzamenantojn por Bratislava komisiono. — Ĝi aprobis por duagradaĵ lernejoj la novan lernolibron de Dro Ŝilha.

La ministerio de poŝtoj deklaris esperanton klara lingvo, pro la Bratislava kongreso jam de la 15. Aprilo 1926.

La ministerio de la eksterlandaj aferoj neniel respondis al nia peto pri senpagaj vizoj por Wienaj partoprenantoj de nia Bratislava kongreso. La tiurilata demando kial ne, restis ankaŭ ne respondita.

La fervoja ministerio permesis 25% rabaton por la kongreso de Bratislava. Ne povis esti uzita, ĉar ne avantaĝa ĉe 200 p.

Urbestraro de Nové Zámky en sia kunveno de 30. Marto 1926 decidis nomi unu straton per la nomo de Dro Zamenhof.

Foiro Praha donis al la Instituto senpagan lokon por stando esperantista, dum la Printempa foiro.

Ĉs. Obec Sokolská ne akceptis nian proponon eldoni esperantan informilon pri la Sokolaj Festoj en 1926. Tamen ili disponigis al ni informan materialon. Esp-a artikolo pri Slet aperis en Progreso, kaj pere de S-ro Ginz en belga gazeto Turner. Ambaŭ dokumentoj estis senditaj al Ĉs. O. S., kiu danke kvitis ilin.

Honora Komitato de ĈAE estis de tempo al tempo informata pri la situacio de nia movado, precipe per represoj de la noticoj Z esperantského světa el La Progreso. Pli ofta kaj eĉ persona rilato kun la H. K. estus tre dezirinda por 1927.

Paska konferenco. La prepara komitato konsistas el la reprezentantoj de diversaj pedagogiaj kaj etikaj societoj. Por ĈAE estas membroj S-roj Eiselt kaj Hromada, por Instituto S-ro Pitlík. La preparoj progresas sukcese ankaŭ el nia vidpunkto kaj ili konsumas grandan parton da nia labortempo.

Partopreno en la internacia movado

Konstanta Repraentantaro kunvenis dum 1926 unufoje: dum Pasko en Locarno. Partoprenis la kunvenojn S-ro Hromada. Tre diversajn instigojn, ricevitaĵojn en la cirkuleroj de KR ni provos realigi en 1927.

Ni povas eldiri nian kontenton, ke la KR-kunveno, kun la kunvenoj de ICK kaj UEA-komitato okazas en 1927 en Praha. En tiu afero la Asocio, tre laŭdirinde helpata

de EK Praha, Rondeto de Esperantistinoj kaj Verda Stelo, faros preparojn por inde akcepti la gastojn, esperante samtempe je multrilata influo de tiu kunveno je nia ĉs. movado.

La 18. kongreson en Edinburg ni ne povis pro troaj kostoj partopreni per nia deiegito.

Oficejo de ĈAE

La laboro de la ĝenerala sekretario konsistas grandparte el respondado al la ricevitaĵoj korespondajoj: petoj pri informo, klubaj leteroj ktp. Plie, kaj tion ni opinias tre grava tasko, bedaŭrinde ne ĉiam kaj regule plenumbla, ni klopodis vekti propagandemon de esperantistoj en multaj lokoj kaj eĉ en kelkaj kluboj. Centoj da leteroj estis senditaj por tiu celo. Sed la vojo estas tro longa kaj klopoda. Tamen en iuj lokoj ni povas kalkuli kun fondo de novaj kluboj, en aliaj ni sukcesis trovi kunlaboranton por la gazetara servo. Dum 1926 nia ĝen. sekr. estis parte helpata de pagita kunlaboranto: en januaro de F-ino Svatá, en majo ĝis septembro de S-ro Echtner. La financa stato devigis, ke tiu helpo mankis en la ceteraj ses monatoj.

Koncerne la 1927, tiu helpo estas necesa por ĉiuj monatoj kaj ni antaŭvidas en nia budĝeto sumon, kiu certe devos esti elspezita.

Ĝenerala impresio

Nia Asocio bone eltenis la plialtigon de la kotizo en 1925. Forfalis ja membroj, pli malpli paperaj, sed la municio, la financaj rimedoj propagandaj pligrandiĝis en 1925. La jaro 1926, kvankam en certa momento la situacio estis tre malespera, montris, ke la nombro de la membroj nefalis. Tiuj 19 mankantaj membroj certe ankoraŭ pagos. Ni do povus eldiri nian kontenton pro la pozicio konservita.

Sed ni celas ja pli alten. Ni ne volas kontentiĝi kun la konservo de la nuna stato. Ni vidas la multajn centojn da ĉs. esperantistoj. Ni konscias la eblecojn, kiujn ni povus atingi en nia lando, se ĉiuj irus manon en mano. Kaj ni celas krei el nia Asocio organizon, kiu estus forta per kunlaboro kaj membreco de ĉiuj ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. En la du pasintaj jaroj ni ne atingis la celatan milon da membroj. Sed ni ne cedos: La celon krei Asocion almenaŭ milmembran ni levas ankaŭ por la jaro 1927, forte esperante, ke ĉiu komprenos, ke alme-

naŭ en la jubilea jaro ni povus montri nian centron inda de atento de niaj oficialaj rondoj, inda pro la nombro de la membroj kaj pro la laboro farita.

FINANCOJ DE ĈAE EN 1926

Konto de en- kaj elspezoj

Koncize, laŭ la raporto de S-ro Fr. Novák, kasisto, aprobita la 13. 3. 27.

Elspezoj

aranĝitaj por vidi, kiom kostis la administrado, kiom ricevis la membroj en la premioj kaj la Bulteno, kaj kiom kostis le propagando.

Administraĵoj:

afranko (duono de la tuta sumo) Kĉ 362·20
poŝta ĉekkonto Kĉ 160·30 Kĉ 522·50

Varbado kaj informado de la membroj:

premioj Kĉ 503·40
Bulteno Kĉ 2.144·10
vojaĝoj (reg. kunv.) . Kĉ 340·— Kĉ 2.987·50

Propagando:

korespondisto Kĉ 950·—
afranko (duono) Kĉ 362·20
Eltranĉaĵoj Kĉ 315·—
presaĵoj Kĉ 1.421·12
loka propagando Kĉ 114·—
Locarna kunveno Kĉ 1.000·—
diversa Kĉ 70·30 Kĉ 4.232·62

Div. etaj elspezoj Kĉ 192·90
Kĉ 7.935·52

Kotizoj al K. R.:

resto por 1926 Kĉ 446·—
partopago 1927 Kĉ 600·— Kĉ 1.046·—
Kĉ 8.981·52

Enspezoj

Kotizoj:
1924—25 Kĉ 514·—
1926 Kĉ 6.772·— Kĉ 7.286·—
Repagita afranko Kĉ 11·50
Profito de vendoj (Ekz. reg.) Kĉ 64·16
Venditaj propagandaĵoj Kĉ 196·40
Interestoj (rentumo) Kĉ 229·62

Donacoj:

E. K. Olomouc Kĉ 200·—
E. K. Plzeň Kĉ 100·—
E. K. Hradec Kĉ 24·—
Králik Zlín Kĉ 14·—
Hudeček Kĉ 5·— Kĉ 343·—
Kĉ 8.130·68

La enspezoj estis do je Kĉ 850·84 malpli grandaj ol la elspezoj. Tiu ĉi diferenco estis do prenita el la asocia kapitalo.

Bilanca konto al 31/12 1926

Aktivoj:

Kaso: Kĉ 571·71
Poŝta ĉekkonto Kĉ 1.202·02
Urba ŝparkaso Kĉ 2.426·99 Kĉ 4.200·72
Vendebblaj presaĵoj Kĉ 547·—
Inventario (skribmaŝino k. a.) Kĉ 1.007·80
Bonhavoj:
E. K. Trutnov Kĉ 20·—
Progreso Kĉ 1.750·— Kĉ 1.770·—
Sumo de aktivoj Kĉ 7.525·52

Pasivoj:

Kotizoj antaŭpagitaj por 1927 . Kĉ 96·—
Neta havaĵo 31/12 26 Kĉ 7.429·52
Neta havaĵo 31/12 25 Kĉ 8.280·36
diferenco (v. konton de en- kaj elspezoj) Kĉ 850·84

GVIDANTARO DE ĈAE EN 1927.

KOMITATO

Membroj:

1. Dlouhá Sidonie, ŭr. st. drah, Praha-15. Wilsonovo nádraží
2. Eisele Josef, vládní rada, Vinohrady, Slezská 58
3. Friedrich Jos., rada st. drah, Košice, Jarná, 20
4. Hromada Rudolf, přednosta, Praha-VII., Sochařská, 333.
5. Dr. Kamaryt Stan., prof. reálky, Bratislava, Telocvičná, 3
6. Keyzlarová Berta, choť obchodníka, Červ. Kostelec, Sokolská, 7
7. Kudela Ant., vrch. soudní oficiál, Olomouc, Horní novosadská, 56
8. Pitlík Aug., vrchní komisař minist. obchodu, Praha-II., Křemencová 17
9. Skleněčka Otto, účetní Živnobanky, Hradec Králové
10. Schmidt Mil., min. rada min. financí, Vinohrady, U divadla, 6
11. Vostrubec Ferd., pošt. pokladník, Praha-VII. Schnellova, 21
12. Bergmann Max, obchodník, Ústí nad Orlicí.

Vicmembroj:

1. Hoffmannová Fr, choť obchodníka, Jaroměř, Villa u zastávky
2. Kubala Alois, důlní úředník, Slezská Ostrava, 1002
3. MUDr. Parma Čestmír, lékař, Praha-II. Ležerova, 56/IV
4. Pittner Frant, profesor, Přerov, Horní nám.
5. Šustr Jaroslav, obchodník, Praha-I., Dlouhá, 59

KONTROLA KOMISIONO

Membroj :

1. Adamík Vlad., učitel, *Michálkovice* u Ostravy
2. Bujarek Václav, pošt. úř., *Nové Zámky*
3. Novák Frant., majitel závodu hodinářského, *Praha-I., Malé nám., 10*
4. Pauk Jar., ml., úředník, *Jablónné nad Orlicí*
5. Weisskopf Mořic, obchodník, *Praha-I., Národní, 37*

Vicmembroj :

1. Hermoch Stan., obchodník, *Kolín-V., Jiráskovo nám., 13*
2. Holancová Anežka, odb. učitelka, *Vyškov*
3. Růžička Frant., profesor, *Holešov*

BUDĜETO POR 1927

(Aprobata de la ĝenerala kunveno la 13. Marto 1927)

Bezono.

Administraĵoj :

afranko, oficejaj bezonaĵoj kaj aliaj Kč 1 500.—

Varbado kaj informado de la membroj :

membraĵpremioj kaj Bulteno Kč 2.000.—

Propadandaj elspezoj :

korespondisto . Kč 2.000.—
 presaĵoj, broŝuroj Kč 5.000.—
 vojaĝoj, paroladoj Kč 2.000.—
 Paskaj kunvenoj Kč 1.000.— Kč 10.000.—

Diversaj Kč 500.—

La sumo de la bezonota mono Kč 14.000.—

Por povi efektiviĝi ĉiujn laborojn laŭ la supra tabelo, Asocio bezonas havi

1000 membrojn po 14 Kč... Kč 14.000.—

La 2 Kč el la kotizo 16 Kč apartenas al K. R. estante pagataj al KR en la sama sumo, en kiu Asocio ilin ricevas de siaj membroj. Tial la KR kotizo ne troviĝas en la budĝeto.

Ĉu vi legis la paĝojn 21—27?

Kian vidpunkto vi havas?

Ne prokrastu ankaŭ vi aliĝi al ĈAE!

VIII. JARKUNVENO DE ĈAE.

Ĝi okazis dimanĉe la 13. Marto 1927 en kafejo Opera, Praha-III.

Partoprenis 50 personoj. Krom Praha'aj membroj estis reprezentitaj Hradec Králové, Ústí n. O., Kladno, Kosmonosy.

Prez. S-ro Eiselt malfermas la kunvenon je la 10. horo, salutas ĉiujn kaj memorigas la mortintajn membrojn: Oskar Braun en Nový Bydžov, Marie Bastlová, Sl. Ostrava, Václav Krajča en Holešov kaj Emanuela Lukšová en Žižkov.

Laŭ ĝenerala konsento, la protokolo pri la lasta jarkunveno ne estis legita, ĉar ĝin konas ĉiuj membroj el la Bulteno kaj venis neniu rimarko al ĝi.

Ĝen. sekretario Hromada prezentas detalan raporton pri la jaro 1926 (ĝian tekston vidu aliloke). Post debato, kiun partoprenis F-inoj Vlčková, Supichová kaj S-ro Sklenčka la raporto estis akceptita. S-ro Sklenčka precipe akcentis, ke la laboro ĉiam kreskas kaj ke necesa estas divido de la laboro inter plurajn membrojn, alie minacas danĝero, ke ĉio haltos en la tago, kiam la ĝisnunaj laborantoj, pro iu ajn kaŭzo, ne povos plulabori. S-ro Hromada deklaras, ke efektive, depost la venonta jaro li estos tiamaniere okupita profesie, ke li ne plu povos trovi tempon por ĉio. Li rekomendas, ke jam de nun oni pensu pri la venonta ĝenerala sekretario, ĉar tiun ĉi funkcion li akceptas en 1927 por la lasta fojo.

Kasisto S-ro Novák prezentas financon raporton pri 1926 kaj budĝeton por 1927 (vidu aliloke). S-ro Votrubec, membro de la Kontrola komisiono, deklaras ke krom li reviziis la kontojn S-ro Friedrich en Košice. Trovinte ĉion en ordo li proponas senŝarĝigon de la komitato. Akceptita.

Raporto de la Scienca Sekcio, verkita de D-ro Kamaryt, estis legita de la ĝen. sekr. kaj akceptita kun dankoj al D-ro K. pro lia malfacila laboro.

Pri la stato kaj uzado de la ekspozicia materialo raportas ĝia administranto S-ro Šustr.

Ambaŭ ĉi raportoj aperos venonte.

Poste estis elektita nova komitato kaj kontrola komisiono (v. p. 26).

Per tio la programo de la kunveno estis elĉerpita. F-ino Supichová demandas, kio estis entreprenita por nia propagando okaze de la Paska konferenco kaj faras diversajn utilajn sugestojn. La debato, kiun partoprenis pluraj membroj finis per interkonsento, ke Instituto faros necesajn aranĝojn inter la instruistaro de Praha. Fino de la kunveno je la 13. horo. Protokolis Hromada.

PASKA ĈAE-KUNVENO EN PRAHA

Ĉar multaj esperantistoj el ĈSR venos al Praha por partopreni la Paskan Konferencon, ĈAE volas uzi tiun ĉi okazon por preparoli gravajn punktojn de nia movado en ĈSR kaj aranĝas

kunvenon de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj dimanĉe, la 17. IV. je la 10. horo

en salono de pensiono Budeč Vinohrady, Wenzigova ul.

Programo :

Debato pri : Bezonoj de la ĉs. movado.

Jubileaj aranĝoj en ĈSR.

Kiel eluzi diversajn favorajn okazojn.

Kiel sukcesi en la entreprenoj, kiuj renkontas persistajn malamikojn.

Ĉiu ĉs. samideano — organizita aŭ ne — estas petata partopreni. Bv. anonci al ni vian ĉeeston kaj viajn eventualajn proponojn por la programo. CAE.

REDAKCIA NOTO

Tiu ĉi numero estas speciale dediĉita al nia propaganda centro, Ĉs. Asocio Esperantista. Ni tre petas niajn legantojn dediĉi sian atenton al la raportoj. Pripensinte iom, vi certe aliĝos. Nia centro devas almenaŭ en la jubilea jaro atingi la nombron de 1000 membroj. La jaro 1927 estas decida kaj de ĝi dependas evoluo de nia movado. Ne restu indifereanta! La afero estas tre, tre grava.

Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

Mezinárodní konference pod heslem Školou k míru, koná se v Praze o Velikonočích, od 16.—20. dubna t. r. Jest svolána Mezinárodním pedagogickým úřadem v Ženevě a pořádána pedagogickými a etickými společnostmi československými pod protektorátem presidenta republiky a za čestného předsednictví ministrů školství a zahraničí. Otázka mírové výchovy a vyučování bude projednávána význačnými pedagogy čs. i zahraničními. Konference zasedá v Histologickém ústavu na Albertově. Aby se sjezd vyhnul ztrátě času, kterou při podobných příležitostech způsobuje překládání do 2—3 jazyků, budou veškeré referáty překládány pouze do esperanta, vzhledem k tomu, že tento mezinárodní jazyk je velmi rozšířen mezi učitelstvem, zvláště v Československu, Sasku a Rakousku a v malých státech východní a jižní Evropy.

260. Esperanto na prvním místě ve vědecké společnosti. Mezinárodní společnost pro studium arktických zemí vzducholodí konala nedávno svou první schůzi v Berlíně. Má na 200 členů z 19 zemí, mezi nimi nejvýznačnější badatele polárních krajín. Předseda společnosti Frithjof Nansen prohlásil při zahájení: Jednacími jazyky společnosti jest esperanto, angličtina, francina a němčina. — K tomuto rozhodnutí došlo, jelikož vynikající členové ovládají tento jazyk. V esperantu byly vydány též stanovy společnosti.

261. Esperanto a radio. Esperanto jest nyní již stálou položkou v programech předních vysílacích stanic. Kursy esperanta jsou vysílány téměř ve všech evropských stanicích, nyní je zavádějí v Belgii obě tamní velké stanice, bruselská Radio-Belgique vyučuje esperantu francouzsky, antverpská vysílačka zároveň vlámsky. Vysílačka v Stuttgartu, jedna z mnohých německých stanic, které mají pravidelný esperantský rozhlas, vysílá nyní za sebou 10 esperantských přednášek o různých předmětech. Velký úspěch mají též esperantské kursy vysílané různými stanicemi americkými. Ve Spojených státech bylo prodáno tisíce učebnic esperanta posluchačům rozhlasu.

262. Japonské vědecké dílo v esperantu. Státní meteorologické observatorium v Tateno (Japonsko) vydalo o tamních povětrnostních poměrech esperantskou zprávu, již rozesílá do všech zemí. Velké dílo obsahující mnoho obrazů, tabulek a diagramů vyšlo prací profesora Oiši, ředitele tohoto observatoria. Přední japonští učenci různých oborů vydávají výsledky svých badání stále hojněji v esperantu.

263. Bystrý zrak, časopis pro oční lékařství, pišící populárně o biologické léčbě očí, dává ke všem svým pojednáním podrobné esperantské resumé. List, jenž vychází vychází v Německu, šíří se v odborných kruzích všech zemí.

264. Oficiální podpora esperantu v Anglii. Anglický ministr vyučování dal svůj souhlas k tomu, aby byly uděleny jako v letech minulých peněžité podpory k zřízení večerních kursů esperanta pro dospělé v různých anglických městech. V Londýně samotném se vyučuje esperantu pod patronací okresního školního výboru v 15 kursech.

265. Esperanto a letectví. Polské letecké školy zařadily do své osnovy vyučování esperantu. Od 1. ledna 1927 se učí mladí polští piloti tomuto jazyku.

266. Esperantské jídelní lístky v cizích zemích. Mimo na mnohé jiné nesnáze, jež nám vznikají v cizině pro neznalost jazyků, vzpomene si zajisté skoro každý turista též na rozpaky před nesrozumitelným jídelním lístkem. Ani velká turistická střediska nemohou v tom směru vyhověti všem, neboť přeložiti názvy pokrmů do mnoha jazyků není věc snadná. Návštěvníci Japonska hlásají nyní, že některé tamní přední hotely přichází v tom směru tím vstříci, že jejich jídelní lístky mají vedle japonských názvů esperantské překlady. Japonci vítají mezinárodní jazyk, jenž jim dává příležitost vymýtiti i zde angličtinu. Esperantské jídelní lístky jsou v evropských zemích sice jen zřídka k spatření, přece však již četné velké hotely obrací svůj zřetel k esperantu, jež jest zajisté předurčeným jazykem světové turistiky.

267. Esperantská soutěž těsnopisecká. List Fluganta Skribilo, propagující esperantský těsnopis, vypisuje již potřetí mezi svými čtenáři soutěž na nejlepší výkony v esperantském těsnopisu. Pro vítěze jest vypsán velký počet odměn. Podmínky soutěže budou oznámeny bezplatně každému, kdo zná esperantský těsnopis nebo se o něj zajímá a dopíše na adresu F. Flageul, 9, Boulevard Voltaire, Issy (Seine), Francie.

268. Brazilská vláda podporuje esperanto. Poslední kongres brazilských esperantistů, konaný ve Victorii, hlavním městě brazilského státu Espirito Santo, znamenal pro esperantské hnutí v jižní Americe velký úspěch. Brazilské ministerstvo vnitra povolilo všem účastníkům sjezdu bezplatnou jízdu na dráze, sjezdový výbor měl právo telegrafovat po celé Brazílii. Kongresu předsedal státní prezident, ve výboru byli delegáti mnoha ministerstev, velkých vědeckých a obchodních společností, dva brazilští biskupové, zástupce hlavního starosty města Rio de Janeiro a velký počet dalších vynikajících osobností. Kongresu byly předloženy profesorem Luiz Porto Carreiro Neto hotové esperantské překlady dvou předních brazilských literárních děl, jež esperantem mají se dostat do známosti ciziny.

269. Geologové a esperanto. Výbor XIV. mezinárodního kongresu geologů v Madridě vydal esperantské pojednání o geologickém útvaru v okolí Kordovy. Nový doklad, že esperanto je používáno ve vědecké práci.

